



ISSN: 0827-3154

Revuo de Kanada Esperanto-Asocio

2000/1

printempo / somero 2000



LUMO

Lumo eldonas dufoje jare KEA, P.O. Box 2159, Sidney, BC, Kanado V8L 3S6
<www.esperanto.ca/kea/>

Lumo ('light') is published biannually by the Canadian Esperanto Association

Lumo ('lumière') est la revue semestrielle de l'Association canadienne d'espéranto

ENHAVO DE LA NUMERO

Agado de KEA	3
Novajoj pri la movado en Kanado	5
Venontaj aranĝoj en Kanado/Ameriko	5
Internaciaj novaĵoj	6
Artikoloj:	
Recenzo de la filmo <i>Incubus</i> (Bob Williamson)	13
Pri Manifesto 2000 (Geoffrey Greatrex)	14
Lundo, Mardo ... (Simon Davies)	15
Kanado estas modelo ... (Ralph Harry)	18
Akrostiko de Marjorie Boulton	19
Ŝercpaĝo	20

LA KOLUMNINO DE LA REDAKTORO

Dum multaj jaroj ne aperis *Lumo*. Iuj membroj eĉ ne scias pri kio temas. La nova redaktoro esperas (sed hezitas promesi!) establi regulecon en la aperigo de la revuo, nun dufoje jare (vidu tuj sube). En Esperantio abundas revuoj, kiuj ĝenerale ĉerpas materialon unu de la alia. La jena revuo ne estas escepto: multajn erojn mi prenis de fontoj kiaj *Interredaktore* aŭ nia halifaksa revuo, *Inter Ni*. Estas neeviteble ke oni tiel ripetu anoncojn, raportojn k.s., sed mi, kiel redaktoro, certe preferus enmeti pli da originalaj kontribuoj. Mi kaptu la okazon tuj do peti al vi, la leganto, pripensi kion vi povus sendi al mi por la venonta numero! (Mi preferas kontribuojn senditajn surdiske aŭ perrete).

Ĉar mi nur lastatempe fariĝis komitatano de KEA, estus utile se mi prezentus min mallonge. Mi naskiĝis en Otavo en 1968, sed transloĝiĝis al Britio en 1975. Tie mi edukiĝis, ĉefe en Oksfordo, kaj tie mi ankaŭ lernis Esperanton. Mi helpis restarigi JEB (Junularo Esperantista Brita) ekde 1988 kaj redaktis ĝian revuon, *Saluton!*, dum pluraj jaroj. En 1989 mi fariĝis komitatano de EAB (Esperanto-Asocio de Britio) kaj en 1992 elektiĝis ĝia prezidanto. Mi eksiĝis kiel prezidanto en 1994 kaj transloĝiĝis al Otavo en 1995, kie mi pasigis unu jaron. Reveninte al Britio, mi denove fariĝis prezidanto de EAB (1997-8), sed devis eksiĝi ĉar mi transloĝiĝis re al Kanado, ĉi-foje al Halifakso. Mi reprezentis EAB ĉe UEA kiel komitatano dum pluraj jaroj kaj prezidis la Eŭropan Esperanto-Union de 1994 al 1996. Mi estas fakulo pri antikva (ĉefe romia kaj bizanca) historio, sed ankaŭ instruas la latinan lingvon; mia nuna posteno estas ĉe Dalhousie universitato.

Sufiĉe pri mi. Mi esperas ke ĉi tiu numero plaĉos al legantoj; se ne, bv. informi min kaj proponi modifojn. Finfine, mi danku Catherine Feeley pro la bildoj, kiuj ornamas la revuon. Dankojn mi ankaŭ ŝuldas al Steĉjo Norvell pro lia afabla kaj lerta helpo pri kompostado kaj al la tuta societo de Halifax-Dartmouth pro enkovertigo de ekzempleroj ktp.

Geoffrey Greatrex, 1007-5415 Victoria Road, Halifax, NS B3H 4K5,
<Geoffrey.Greatrex@dal.ca>, faks. (902)-494-2467.


➤ *Limdato por kontribuoj al la venonta numero: 1a de decembro 2000.*

AGADO DE KEA

(1) La komitato aprobis la proponon de Geoffrey Greatrex ke *Lumo* aperu nur dufoje jare.

Estas la sincera espero de la nuna redaktoro tiel certigi ke *Lumo* regule aperos. La situacio pri numeroj de *Lumo*, kiuj devintus jam aperi, estas jena. *Lumon* 3/4 (1996) redaktas Paul Hopkins; malgraŭ sia okupiteco, li esperas elsendi ĉi tiun numeron antaŭ la fino de julio. Li ankaŭ preparas novan numeron de *Esperanto Update*. Bob Williamson pretigas duoblan numeron de *Lumo* por la jaroj 1997-8; ĝi progresas malrapide pro lia okupiteco. Wally du Temple intencis redakti *Lumon* por 1999, sed devis rezigni; lian taskon transprenis lastatempe Ciprian Jauca.



(2) Dum majo Ruediger Eichholz vendis sian domon en Bailieboro kaj, ne plu havante lokon por teni la restan stokon de Esperanto-Prezo, donacis ĝin al Kanada



Esperanto-Asocio. Normand Fleury kaj Zdravka Metz faris heroan vojaĝon kaj alportis ĉiujn librojn de Bailieboro al Montrealo. Temas pri multaj miloj de libroj: iuj vendiĝos por rekapti la kostojn alporti la librojn al Montrealo (UEA jam mendis librojn en valoro de \$500), iuj aldoniĝos al la biblioteko de la Montreala Esperanto-klubo, sed la plej granda parto de la stoko, 2000+ ekzempleroj de la informlibro *Esperanto en la Moderna Mondo/Esperanto in the Modern World*, distribuiĝos kiel eble plej vaste kaj libere. Tiurilate la estraro de KEA


jam faris tri decidojn:

(i) KEA pagos la sendokostojn por sendi de Montrealo pakaĵojn de ĉi tiu libro al tiuj grupoj/individuoj kiuj pretas distribui ĝin loke. (Se vi pretas - persone - distribui ekzemplerojn al lernejoj, bibliotekoj, radiostacioj, ĵurnalistoj, ktp. de via regiono, kontaktu la Libroservon ĉe <esperanto@sympatico.ca>.)



(ii) KEA (per la Libroservo) sendos leteron al ĉiuj membroj de KEA en Kanado kaj Usono aldonante kuponon por senpaga ekzemplero de ĉi tiu libro. Ĉiu, kiu resendos la kuponon ricevos la libron kaj KEA pagos la sendokostojn. (Membroj en aliaj landoj povos ankaŭ ricevi senpagan ekzempleron, sed ni petas ilin pagi la sendokostojn.)

(iii) KEA starigos specialan fonduson kun la celo pagi la sendokostojn de pluraj ekzempleroj de ĉi tiu libro al malriĉaj landoj (ekz. Afriko, Sud-Ameriko, Orient-Eŭropo), petante la membrojn de KEA ke ili kontribuu al tiu fonduso.



(Sendu viajn donacojn al la adreso de KEA en Sidney kun noto ke via donaco estas por sendi *Esperanto en la Monda Mondo* al malriĉaj landoj. Ni petas ankaŭ donacojn al la ĝenerala kaso de KEA por helpi kun la kosto distribui la libron en Kanado. Memoru ke KEA estas registrita karitata asocio kaj donas impost-malaltigan kvitancon por ĉiu donaco de almenaŭ \$10.)

Pri la libro: temas pri 600 paĝoj da informoj pri la lingvo, elĉerpitaj el plej diversaj fontoj inter la jaroj 1959 kaj 1982. Plejparte la libro estas dulingva: oni vidas unu paĝon da materialo en E-o kaj aliflanke anglan tradukon. Sed estas artikoloj nur en la angla (pri E-o) kaj kontribuoj nur en E-o. Laŭ la antaŭparolo (la angla versio, citita en la angla), the aim of this book is:

(1) to show how language problems have developed over the centuries, especially during recent decades, and how they affect today's world; (2) to give people with no knowledge of Esperanto the necessary linguistic tools to enable them to judge the possibilities of the International Language, and to read even difficult Esperanto texts; (3) to give bilingual samples of recent Esperanto articles to show the literary qualities, the scientific and technical applications of the language, and how Esperanto is used in practice today.

La libro estas malmole bindita. Interne, ĉar oni simple ofte represas artikolojn, oni tuj vidas la diversecon de la karakteroj ('fonts') uzitaj. Iom pro tio (kio aspektas iom malbele) kaj iom pro la malaktualeco de la libro, ĝi ne estas ideala propagandmaterialo hodiaŭ. Sed ni esperas ke ĝi interesos membrojn, kiuj ankoraŭ neniam ĝin vidis, kaj ke ili povos utiligi ĝin por informi la publikon (ekz. per donaco al biblioteko).

La komitatanoj de KEA estas:

Ciprian Jauca (prezidanto)
Wally du Temple (kasisto)
Neil Parker (sekretario)

Matthew Chisholm
Geoffrey Greatrex
Normand Fleury
Brian D. Kaneen
Paul Hopkins
Matthew McLaughlin
Bob Williamson

Adresojn kaj retadresojn vi trovos en la plej lasta adresaro de KEA.



NOVAĴOJ PRI LA MOVADO EN KANADO

Halifakso: la grupo kunvenas dufoje monate. En septembro ĝi reprezentigos ĉe la 'Word on the Street' stratfestivalo per budo en tendo. La societo ankaŭ lastatempe akiris por si ekzempleron de la filmo *Incubus*, recenzon de kiu vi trovos sube.

Montrealo: Zdravka Metz demandas: ĉu ni faru libron de ĉiuj Esperantistoj en Kanado kiuj estis kaj estas? Ĝi estus valora kontribuo por verki historion de la movado - eble oni povus ricevi ian subtenon de registaro, privatuloj. Estas tasko pri kiu povus okupiĝi lokaj kluboj kaj klubanoj povus kune verki pri ĉiu homo lau ilia memoro, kaj la vivantaj diru 3-5 frazoj pri si. *Kion vi opinias?*

Toronto: la grupo ĝenerale kunvenas lunde je 18h00 ĉe la kafejo 'Timothy's' ĉe la nordorienta angulo de la stratoj Bay kaj College.

Ne ĉiuj grupoj troviĝas ĉi tie, estas tuj evidente. Kaj la raportoj estas tre mallongaj. Tio nepre ne implicas ke niaj grupoj estas neagemaj; anstataŭe, ĝi signifas ke mankas informoj al mi ĉi-momente. Mi multe esperas ke mi ricevos pli da novaĵoj por enmeto en la venontan numeron. Bonvolu noti ke informoj pri multaj grupoj konsulteblas per la teksaĵo, irante al la hejmpaĝo de KEA.

VENONTAJ ARANĜOJ KANADAJ/AMERIKAJ

7-9 okt. 2000: 7a Internacia Semajnfino Esperantista en Okemo (Vermont, Usono). Pliajn informojn petu de OKEMO 2000, 6358-A rue de Bordeaŭ, Montréal, Kebekio H2G 2R8, aŭ trovu ĉe:

<www3.sympatico.ca/esperanto/Okemo2000h.htm>

19 nov.-4 dec. 2000: 13a E-renkontiĝo de Okcidenta Regiono, Campo Grande. Kontaktu: EKOR, str. Cel Agostinho 126 fundos, BR-23050-360 Campo Grande - RJ, Brazilio.

15-21 apr. 2001: 5a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto en Meksikurbo (Meksiko). La temo estos 'Ameriko: unu kontinento, diversaj historioj'. Informoj haveblaj de: Federación Mexicana de Esperanto, Apartado Postal 10576, MX-06000, Mexico, D.F. MEKSIKO, faknumero (de Michael Porter) 52-5-5624333, retadreso <mike@math.cinvestav.mx>. TTT-paĝo: <punto-y-aparte.com/esperanto>.



INTERNACIAJ NOVAĴOJ

Bonvolu noti ke la plejparton de ĉi tiuj novaĵeroj mi ĉerpis el retfontoj - aparte el la gazetaraj komunikoj de UEA kaj 'Interredaktore'. Mi ne pretendas do ke ili estas nepre tre lastatempaj nek verkitaj de mi. Mi konscias tamen ke ne ĉiuj anoj de KEA havas retaliron, kaj tial esperas ke ilin interesos la eroj ĉi tie prezentitaj.

ESPERANTISTOJ EN AMASMOVADO POR KAMPANJO 2000

La Ĝenerala Asembleo de UN proklamis la jaron 2000 Internacia Jaro por la Kulturo de Paco. Okaze de la 50-a datreveno de Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj en 1998 grupo da Nobel-pacpremiitoj, i.a. Mikhail Gorbachov, Nelson Mandela kaj Shimon Peres, projektis tekston de MANIFESTO 2000 POR KULTURO DE PACO KAJ SENPERFORTO, kies ses bazaj principoj estas:

- Respekti ĉiun vivon;
- Rifuzi perforton;
- Dividi kun aliaj;
- Aŭskulti por kompreni;
- Konservu la planedon; kaj
- Remalkovri solidarecon.

Unesko lanĉis amasmovadon por diskonigi MANIFESTON 2000 kaj por kolekti apogajn subskribojn por ĝi. Ĉiu subskribo estos persona sindevontigo realigi la celojn de MANIFESTO 2000 'en mia ĉiutaga vivo, mia familio, mia laboro, mia komunumo, mia lando kaj mia regiono.' La subskriboj estos transdonitaj al la Ĝenerala Asembleo de UN en septembro 2000 kiel esprimo de la monda civila socio por paco kaj senperforto. La celo de Unesko estas kolekti 100 milionojn da subskriboj.

UEA, kies ĉi-jara kongreso en Tel-Avivo estas agnoskita de Unesko kiel Flagŝipa Evento de la Internacia Jaro por la Kulturo de Paco, alvokas al ĉiuj esperantistoj, ke ili konatiĝu kun MANIFESTO 2000 kaj subskribu ĝin, kaj ke ili diskonigu ĝin kaj kolektu por ĝi subskribojn kiel eble plej vaste en sia propra vivmedio, inter esperantistoj kaj ĉiuj aliaj.

Oni povas subskribi pere de Interreto <www.uea.org/2000.html> au per la Esperanta faldfolio eldonita de UEA kunlabore kun Unesko. La faldfolio enhavas la tekston de MANIFESTO 2000 kaj kuponon por la subskribo. Ĝi dissendiĝis kun n-ro 3/2000 de la revuo "Esperanto", sed Esperantaj asocioj, kluboj, gazetoj, organizantoj de eventoj, kaj unuopuloj povas peti kromajn ekzemplerojn de la Centra Oficejo, indikante la kvanton.
(feb. 2000)

Ndlr: Ĝuste pri ĉi tiuj kampanjon mi verkis iom malpozitivan artikolon por *Inter Ni*, kiun mi represas sube (p.14).

PLI OL MIL GASTIGANTOJ EN PASPORTA SERVO

La plej fama servo de TEJO, Pasporta Servo, spertis 14-procentan kreskon en unu jaro. La ĵus aperinta listo de gastigantoj enhavas 1075 adresojn en 76 landoj. En 1999 la libreto nombris 945 adresojn. Plej multe da gastigantoj (91) estas en Rusio, dum geografie la reto estas plej densa en Francio kun 61 lokoj. La vera metropolo de Pasporta Servo estas Multan en Pakistano, kie 17 gastigantoj atendas vizitantojn.

En la bele presita 187-paĝa poŝlibro troviĝas, krom la adresoj kaj aliaj informoj pri la gastigantoj, ankaŭ mapoj kun indikoj pri ĉiuj lokoj kun gastigantoj, tiel ke eblas facile plani sian vojaĝon. Enestas ankaŭ reguloj kaj konsiloj pri la uzo de la servo, aliaj utilaj adresoj kaj fragmentoj el la vojaĝrakonto de Amanda Higley el Usono kiu dum pli ol unu jaro en 1999 kaj 2000 vagadis tra Eŭropo.

Per Pasporta Servo vojaĝantaj esperantistoj, kiuj membras en ĝi, rajtas je senpaga tranoktado ĉe la gastigantoj. Membro de Pasporta Servo estas ĉiu kiu posedas la adreslibron. Gastigantoj ricevas la libron senpage, dum aliaj povas aĉeti ĝin.

La ideon pri Pasporta Servo, tiam sub la nomo 'Programo Pasporto', prezentis la argentinano Ruben Feldman Gonzalez en 1966. La unua adresaro laŭ la nuna sistemo aperis en 1974 sub la gvido de Jeanne-Marie Cash el Francio. Ambaŭ pioniroj troviĝas inter la gastigantoj ankaŭ en la plej nova eldono, kies amplekso fariĝis jam 27-obla kompare kun la unua listo de 40 adresoj. La administranto de tiu ĉi servo de TEJO estas Derk Ederveen el Nederlando.
(feb. 2000)

SALUTON! KAJ HEJMA VORTARO VENKIS

EN LA FURORA VENDOJARO

La libroservo de UEA atingis en 1999 sian plej bonan rezulton dum la 90-aj jaroj. Ĝiaj vendoj sumiĝis je 316 230 guldenoj (EUR 143 499), kio estis 6% pli ol en 1998, kiam temis pri 298 448 guldenoj (EUR 135 430). Kompare kun la antaŭa jaro la vendoj kreskis kaj en la vendejo en Roterdamo kaj en la libroservo dum la UK en Berlino. La sukcesa vendado en Berlino estis rimarkinda, ĉar la UK mem estis iom malpli granda ol en Montpeliero.

La bona rezulto parte sekvis el la vigleco de la propra eldona agado de UEA, kiu laŭ la esploroj de A. Korĵenkov (*La Ondo de Esperanto*, 2000:2) estis la plej produktema Esperanta eldonisto en 1999. Tio montriĝas ankaŭ en la multeco de UEA-eldonaĵoj inter la plej furoraj titoloj. Du el tri plej pintaj furoraĵoj estis titoloj de UEA.

Unufoje post 1990 lernolibro estis la plej multe vendita libro. Kiel en 1990, ankaŭ en 1999 temis pri *Saluton!*, la aŭtodidakta lernilo de Audrey Childs-Mee, kaj la alta loko de *Hejma vortaro* inter la unuopaj vendoj estas rimarkinda, ĉar la libro aperis nur en oktobro.
(marto 2000)

LA MALCENTRA OFICEJO DE UEA

Ĉiuj konas la Centran Oficejon de UEA en Roterdamo. Malpli konata estas ĝia anekso en Amsterdamo, kvankam ĝi ekzistas jam de 20 jaroj. Precize en la somero de 1980 ĝi komencis sian funkciadon. Nu... vera oficejo ĝi ne estas. Nur unu ĉambro. Tiaj 'oficejoj' abundas en nia movado. Ĉiu aktivulo en Esperanto Nederland havas tian 'oficejon': ĉambro kun paperoj kaj maŝinoj.

Tamen, kara leganto, mi bezonas vian atenton por tiu ĉambro en Amsterdamo, kie komenciĝis la novstila afrika agado de UEA en 1980. Bonvolu sekvi min, eniri kaj aŭskulti min. Ne estas loko por eksidi, sed mi klopodos tedi vin mallonge.

Esperanto en Afriko disvastiĝis depost 1980 multe, kaj (ni esperu) definitive. Ne estas malfacile trovi lernantojn en tiu kontinento: ili svarmas en klasĉambro aŭ en mia leterkesto. Multaj estas junaj; ili esperas per tiu nova lingvo ligi kontakton kun la vasta mondo. Precipe kun la riĉa mondo. La mis-supozo ke Esperanto kondukas al postenoj, stipendioj kaj vojaĝoj kaŭzas foje seniluziigojn. Sed krom seniluziigoj okazis ankaŭ multaj mirakloj. Foje iu aŭ alia mia amiko konfidas al mi, ke Esperanto ŝanĝis lian vivon.

Revuo *Esperanto* de januaro 1990 publikigis la ĉefartikolon 'Por plia jardeko da Esperanto en Afriko'. Ĝi resumis la spertojn de unu jardeko kaj skizis la agadprincipojn por sekvonta jardeko. Se vi volas ricevi ĝin, petu ĝin de mi. Se hodiaŭ mi devus verki novan 'Por plia jardeko da Esperanto en Afriko', mi verŝajne invitus iujn el miaj afrikaj kolegoj fari tion anstataŭ mi. Ili ekzistas kaj laboras. Ili instalas la movadon en sia kontinento, iuj jam dum dudek jaroj.

Legantoj de la nederlanda Esperanto-revuo *Fen-x* regule trovis artikolojn de afrikaj aŭtoroj en sia revuo. Ili do jam gustumis tiun kontinenton. Pluraj nederlandaj esperantistoj delonge rilatas 'ĝemele' kun afrikanoj, ekzemple en Niĝerio aŭ en Malagasio (Madagaskaro). En Nederlando jam prelegis afrikaj gastoj, ekzemple Jean Codjo, Raoul Hounnake, Gbeglo Koffi. Jean Codjo revenis al sia lando, Benino, kaj ĵus informis min pri siaj mirindaj progresoj tie. Per la helpo de manpleno de germanaj esperantistoj (li vizitis Germanujon dum duonjaro) li instalas oficejon, kiu jam funkcias kiel retpoŝta stacio por multaj lokaj esperantistoj. Li ĵus konstruis unuklasan lernejon en vilaĝo Codji, kie en oktobro 150 infanoj komencis lerni surpaperigi siajn pensojn kaj esti kleraj por decidi por si mem. Ili samtempe al kutimiĝas al Esperanto, sed ne estas devigataj lerni ĝin. Tia lernejo estas io tre bona kaj fierinda. Kiam alvenos fotoj kaj novaj informoj, tiuj eble vekos pli da subtenemo en Germanujo kaj aliloke.



Subtenado per amika korespondado, per koresponda instruado, kaj... per mono, estas la ŝlosilo por sukcesigi tiun mirindan laboron. Kara leganto, por ne tedi vin tro longe, mi donos al vi mian dezirliston de donacoj por la dudekjara jubileo.

- ★ Lernejo en Lomé, Togolando: 50 000 gld.
- ★ Tekformataj komputiloj por diversaj landoj: po 3 500 gld.
- ★ Abonoj al la revuo *Kontakto*: po 20 gld. jare.

Pri la revuo *Kontakto* vi sciuj, ke post jardekoj da donaca abonado de proksimume 200 ekz. jare, nun ni devas rompi tiun tradicion. La donacoj al Fondaĵo Afriko tiel akre mankas ke ili ne plu kovras la kreskantan monbezaron. Reage al tio, jam unu nederlanda esperantistino spontanee donacis abonojn de *Kontakto* kaj de *El Popola Ĉinio* al ĉiuj kluboj en Madagaskaro. Kompreneble, vi ankaŭ povas sendi vian propran ekzempleron, leginte ĝin, al via afrika korespondanto. Eble vi ridas, vidante: Lernejo - 50.000 gld. Sed en la prosperega parto de la mondo tiaj sumoj jam ne estas fantaziaj. Foje riĉaj esperantistoj donacas aŭ heredigas grandajn sumojn, ekzemple por aĉeti domon.

Ni devas plu certigi al la afrikaj aktivuloj, ke ilia laboro trovas simpatian kaj subtenadon. Vi povas fari tion per donaco al Fondaĵo Afriko de UEA pere de la kotizperanto de UEA en via lando aŭ rekte al iu el la poŝtaj aŭ bankaj kontoj de UEA (vd. Jarlibron 1999, p.37-38.), neforgesante mencii la celon 'por Fondaĵo Afriko'. Se vi deziras pli da informoj aŭ se vi havas konsilojn aŭ proponojn, mi volonte estos je via dispono. Jen mia adreso: Kastelenstraat 231, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando; telefono kaj fakso + 31 20 6421853.

Hans Bakker (Komisiito de UEA pri Afrika Agado) (marto 2000)



STUDO PRI LA ESPERANTISTA PACLABORO

UEA eldonis ĝisdatigitan version de la historia skizo de d-ro Ulrich Lins pri la kontribuo de UEA al paco. La nova 12-paĝa kajero, *La laboro de Universala Esperanto-Asocio por pli paca mondo*, aperis en la Esperanta kaj anglalingva serioj de Esperanto-dokumentoj.

Antaŭenigo de paco kaj interkompreniĝo estas esenca parto de la agado de UEA ekde ĝia fondo, same kiel por Zamenhof la idealo de paco estis ĉefa instiganto por krei Esperanton. De la studo de Lins profitas ĉiu, kiu deziras profundigi sian konon pri la historio de Esperanto, ĉar en konciza formo ĝi provizas la leganton per multaj informoj.

La angla kajero estas utila informilo por distribuo inter ne-esperantistoj, ekz. dum konferencoj, foiroj kaj ekspozicioj, ĉar ĝi prezentas konkrete la laboron de esperantistoj kiel gravan socian agadon anstataŭ simpla hobio. UEA aperigos ankoraŭ francan tradukon de la kajero. Tradukoj al aliaj lingvoj ekz. fare de landaj asocioj estas tre dezirindaj.

Unuopa kajero en Esperanto au angla kostas 2,15 eurojn. Ekde samtempa aĉeto de 3 ekzempleroj la libroservo de UEA donas trionan rabaton.

(aprilo 2000)

TEL-AVIVO SUPERIS LA UNUAN MILON

La 85-a Universala Kongreso en Tel-Avivo nombris je la 12-a de aprilo 1030 aliĝintojn el 51 landoj. Sekve la ĉi-jara UK lasis malantaŭ si la du solajn UK-ojn post la dua mondmilito kiuj havis malpli ol mil aliĝintojn: Portlando 1972 (923) kaj Vankuvero 1984 (802).



La lastatempa akceliĝo de la aliĝritmo promesas bonan ŝancon, ke la Tel-Aviva UK grimpos ankoraŭ pli supren en la postmilita kongresa statistiko. Por tio ĝi devos preterpasi almenaŭ la Rejkjavikan UK de 1977, al kiu aliĝis 1199 kongresanoj. Poste sekvas Adelajdo 1997 (1224), Kopenhago 1975 (1227), Ateno 1976 (1266) kaj ankaŭ la UK en 1967, celita okazi en Tel-Avivo sed translokita al Roterdamo (1265).

(aprilo 2000)



MULTAJ VIZITANTOJ EN LA MALFERMA TAGO

La Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA evidente estas veter-imuna aranĝo. Malgraŭ somermeze belega kaj varma vetero ĝia 12-a eldono sabaton, la 13-an de majo, kolektis saman nombron da vizitantoj (85) kiel unu jaron pli frue en malpli bela tago. Krom el pluraj eŭropaj landoj, po du vizitantoj venis eĉ el Brazilo kaj Japanio.

La ĉefgasto estis Gian Carlo Fighiera, iama KKS de UEA kaj multflanka movada aktivulo. Li prelegis trifoje pri la obstakloj kaj ŝancoj, kiujn li vidas por Esperanto en la tria jarmilo. Grandan atenton li donis al la decida rolo de UEA tiurilate. Kiel Fighiera atentigis, almenaŭ naŭ el dek esperantistoj referencas al UEA, sendepende de tio, ĉu ili mem membras en ĝi. Laŭ peto de UEA Fighiera prilaboros sian prelegon, konsiderante ankaŭ la ideojn el la viglaj postprelegaj diskutoj, por aperigo en la serio de Diskutkajeroj de UEA.

Krom auskulti Fighiera, spekti filmojn kaj babili ĉe la kaftablo, la gastoj ankaŭ multe butikumis en la libroservo, kiu vendis dum la tago por 4816,69 guldenoj. Ĉefe furoris novaj libroj de UEA, kiel *Paĉjo, kio estas rasismo?* (10 ekz.), *Esperantaj sinonimoj* (8), *Kio estas demokratio?* (6) kaj *Hejma vortaro* (5). Inter la verkoj de aliaj eldonistoj elstaris la romano *La ŝtona urbo* de Anna Lowenstein (7).

Jam nun la Centra Oficejo invitas por sia sekva Malferma Tago, kiu okazos la 25-an de novembro.

(majo 2000)

KONSILANTO DE LA ALTA PROTEKTANTO AKCEPTIS LKK

D-ro Zdravko Jelenovic, kulturkonsilanto de Stjepan Mesic, prezidento de Respubliko Kroatio, akceptis reprezentantojn de la Loka Kongresa Komitato de la 86-a Universala Kongreso de Esperanto en la Oficejo de la Prezidento la 10-an de majo. La delegacion gvidis akademiano Dalibor Brozovic, prezidanto de Kroata Esperanto-Ligo kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Spomenka Stimec kaj Dalibor Seatovic informis la konsilanton pri la evoluo de la preparlaboroj por la UK kaj pri la kontribuo de Esperanto al la internacia diskonigo de la kroata kulturo. La kulturperadaj atingoj dum naŭ jardekoj de Esperanto en Kroatio estas ne malgrandaj.

Esperantistoj dankis ke la prezidento Stjepan Mesic akceptis fariĝi Alta Protektanto de la 86-a Universala Kongreso okazonta en Zagrebo en 2001. D-ro Stanko Nick, eksterapolitika konsilanto de la prezidento, estas aktiva membro de la Honora Komitato de la Zagreba UK, pri kio d-ro Jelenovic esprimis apartan kontenton.

(majo 2000)

LA LIBROSERVO DE UEA EN INTERRETO

Kompleta katalogo de libroj, diskoj, kasedoj, videofilmoj, insignoj k.a. varoj vendataj de la Libro servo de UEA estas nun konsultebla en TTT ĉe <http://www.uea.org/katalogo> Kun 4100 titoloj la sortimento estas senkompare la plej granda en Esperantujo.

En la reta katalogo oni povas serĉi librojn laŭ kategorio, titolo, aŭtoro, tradukinto kaj traduklingvo. Oni povas tre facile elekti la deziratajn varojn, kompili mendon kaj sendi ĝin al la Libro servo de UEA, kiu tuj plenumos ĝin.

La katalogo estas regule aktualigata, dum la libroforma katalogo, aperonta en oktobro, ne-eviteble iom post iom malaktualiĝos.

La enretigo de la katalogo estis teknike realigebla danke al la kompetenta volontula laboro de Michiel Meeuwissen el Nederlando.

(majo 2000)

KONTAKTO EN URBO KAJ VILAĜO

La tria ĉi-jara numero de KONTAKTO ĉeftemas pri urba vivo. Prezentiĝas du metropoloj gastigontaj kongresojn ĉi-jare: Tel-Avivo, kiu organizas Universalan Kongreson de UEA, kaj Honkongo, kie okazos la Internacia Junulara Kongreso de TEJO. Ambaŭ urboj kun hektika vivo kaj multaj vidindaĵoj en multkultura medio.

Paralele al ili prezentiĝas duobla urbo - au ĉu du urboj? Ruben Feldman Gonzalez, kunfondinto de Pasporta Servo kaj fondinto de la Meksika Filio de AIS priskribas la vivon en la usona Kaleksiko kiu limas kun meksika Meksikali, kaj debatas limojn eksterajn kaj internajn. Kontraste al la urba temo Robert Dismas, Tanzanio, priskribas vilaĝan vivon surbaze de propraj spertoj.

Plie, IKEL-prezidanto Daniele Vitali en ekskluziva intervjuo por KONTAKTO rakontas pri siaj multflankaj intereso, i.a. fonetiko, tolkienologio kaj etnismo. Elstaras ankaŭ artikolo de rolfo, interretano, pri la fenomeno tempo. Ne maltrafenda por ajna uzanto de la Interreto!

Kontakto, pro siaj facillingvaj artikoloj kaj varia enhavo, aparte bone taŭgas por kursoj kaj kluboj. Ĝi regule informas kaj analizas sociajn kaj kulturajn fenomenojn, kaj provizas distron al legantoj de ĉiu aĝo. Ĉi-jare la revuo okazigas konkurson pri facillingva verkado kun multaj interesaj kaj valoraj premioj (vidu Kontakton 1/00 kaj 3/00). Partoprenu ankaŭ vi!

Abono de Kontakto por 2000 (6 n-roj) kostas 18 EUR por la riĉaj landoj; por la landoj de la t.n. B-tarifo 9 EUR. Grupaj abonoj (ekde 6 ekz.) ĝuas grandan rabaton. Abonojn akceptas la perantoj de UEA kaj la Centra Oficejo.

Vidu ankaŭ <<http://www.esperanto.org/TEJO/>> ---> Kontakto

(junio 2000)

ARTIKOLOJ

Recenzo de la filmo Incubus (1965) 76 min., nigra-blanka, verkis kaj reĝisoris Leslie Stevens; roluloj: William Shatner, Allyson Ames, Eloise Hardt, Ann Atmar, Milos Milos; produktisto: Anthony Taylor, kinematografisto: Conrad Hall; komponisto: Dominic Frontiere

Temas pri profesie farita filmo tute en Esperanto, la sola farita ĝis nun en Usono! Tiu devas vekti la atenton kaj intereson de ĉiu esperantisto. Inter la geaktorj troviĝas eĉ William Shatner, mondfama pro sia pliposta ĉefrolo de kapt. James T. Kirk en la televida kaj filma serioj 'Star Trek' (Stel-migrado). Multaj esperantistoj multe dezirus vidi lin roli en la internacia lingvo. Tiel ankaŭ mi pensis antaŭ ol mi vidis la filmon, sed poste mi opinias ke *Incubus* (Inkubo) vere ne estas filmo por esperantistoj. Tiuj, kiuj tamen deziras vidi la filmon prefere prunteprenu ĝin kaj evitu la grandan elspezon.

Diversaj kialoj allogas nin al filmoj, inter ili la rakonto, la geaktorj, kaj la aspekto de la filmo. La filmon verkis kaj direktis Leslie Stevens, kreinto de la televid-serio 'Outer

Limits' (Foraj limoj), kaj la rakonto similas al epizodo de tiu serio, kiu temis pri eksterordinaraj kaj eĉ hororaj okazaĵoj. Kia (pr. Kaja) (Ames) estas sukubo, bel-aspekta diablino kiu allogas malvirtulojn kiel unuan viron al la maro kaj dronigas ilin sub la piedo. Sed ŝi ne estas kontenta. Ŝi deziras uzi la povojn por detrui virtan heroon. Fratin-sukubo (Hardt) avertas ŝin pri la forta povo kiun virtuloj nomas amon. Sed la memfida Kia serĉas heroon por detrui, kaj trovas Markon (Shatner) kun sia fratino (Atmar). Tuj komenciĝas la batalo inter bono kaj malbono, sed tiu temo neniam vere disvolviĝas. Kiam Kia fiaskas kaj ankaŭ enamiĝas kun Marko, ŝi kaj la fratino alvokas diablan inkubon (Milos) el la grundo por perforti la fratinon de Marko kun la intenco malvirtigi lin kaj instigi lin al murdo pro venĝo. Je la fino, Marko sukcesas savi sian animon en la preĝejo, kaj ankaŭ helpas savi la animon de Kia, la amatino. Jen la stranga rakonto el alia epoko.



La filmo estas bone, eĉ bele fotografita. Ĉi-monate la kinematografisto Hall gajnis duan Oskar-premion pro sia laboro en *American Beauty* (Amerika beleco). La rakonto okazas en nedifinita tempo kaj en pejzaĝa regiono apud la maro. Kvankam oni intencis ke la etoso estu minaca, la manko de koloro en tiom belega regiono aspektas anakronisme kaj forprenas de la lertaj teknikoj konataj de Hall. Oni jam vekis senton de minaco kun la tre efika muziko de Frontiere, kaj tiu intencita forpreno de koloro malhelpas la filmon laŭ mia opinio. Kompreneble, la ĉefa allogo por ni estas la uzado de nia lingvo. En intervjuo por usona Nacia Publika Radio (NPR) la produktisto Tony Taylor donis la kialon por la uzo de Esperanto. En tiu epoko oni celis trovi spektantaron en artaj kinejoj, kie ofte troviĝis alilingvaj filmoj de direktoroj kiel la svedo Ingmar Bergmann. La intenco estis krei alilandan, alimondan etoson, sed sen rilato al rekonebla nacio. Tial oni elektis Esperanton kiel lingvon kiun neniu komprenus. Oni ne intencis ke la lingvaĵo estu komprenata de iu ajn, kaj oni preskaŭ sukcesis eĉ kun esperantistoj. La malabunda dialogo mem ne estas aparte malbone verkita, sed evidentiĝas ke la geaktorj ne havis sufiĉan tempon aŭ helpon de parolpova esperantisto por scii kiel elparoli la lingvon.

Malmultaj frazoj estas mezbone elparolitaj, plimultaj estas apenaŭ kompreneblaj. La lingvaĵo estas kvazaŭ-Esperanto, kaj oni povas facile kompreni kial, je la unua prezento de la filmo, esperantistoj laŭte kaj tumulte plendis. Ili esperis aŭdi Esperanton, kaj oni trompis la esperojn.

Lastatempe Taylor sukcesis trovi kaj restarigi la filmon, kaj nun li vendas kopiojn en la inter-reto. La halifaksa grupo jam aĉetis kopion de la vidbendo por la Libraro Ludovika. Ni devis pagi entute iom pli ol 75 kanadaj dolaroj (kosto por la kasedo, sendokostoj, valuta interŝanĝo, kanada imposto kaj doganaj kostoj) kaj la filmo ne valoras la elspezon. La filmo *Incubus* eble interesas aliajn homojn kiel Shatner-ŝatantojn kaj aliajn, kiuj ne scipovas la internacian lingvon, sed ĝi ne estas filmo por esperantistoj. Kiel la fratin-sukubo diris al Kia, 'Mi avertas vin!'

Plia informo (en la angla) troviĝas ĉe <www.incubusthefilm.com>.

Bob Williamson

(La artikolo jam aperis en la aprila numero de *Inter Ni*)



PRI MANIFESTO 2000

Antaŭnelonge mi ricevis, kun aktuala numero de la revuo *Esperanto*, faldfolion pri 'Manifesto 2000: Paco en niaj manoj'. Temas pri kvinpunkta plano rilata al la fakto de UN deklaris la jaron 2000 'Internacia jaro por la kulturo de paco'. Oni anoncas ke la subskribojn oni prezentos al la Ĝenerala Asembleo en septembro 2000.

Unuavide, kiu povus dubi la valoron de tia petskribo - kiu postulas de tiu, kiu subskribas ĝin, ke tiu (1) respektu ĉiun vivon, (2) rifuzu perforton, (3) dividu kun aliaj, (4) aŭskultu por kompreni, (5) konservu la planedon kaj (6) remalkovru solidarecon? La subskribanto, notindas, 'devontigas sin en sia ĉiutaga vivo, familio, laboro ktp.' sekvi la principojn supre listigitajn. Tuj do estas evidente ke ĉi tiu manifesto tre malsimilas al la nun bone konata 'praga manifesto'. Dum la praga manifesto strebas atentigi homojn pri Esperanto kaj ĝia utileco, kaj postulas de eventualaj subskribantoj nur ke ili ĝenerale subtenu Esperanton, Manifesto 2000 estas multe pli ambicia. Kaj tie troviĝas la problemo.

Antaŭ kelkaj monatoj mi notis en kanada tagĵurnalo artikolon pri la rimarkinda malsukceso de manifesto en urbo en la kanada provinco Ontario. Tie virina grupo verkis manifeston, kiun ili petis al viroj subskribi. Per subskribo ili promesis neniam plu trakti virinojn perforte. Post kelkaj semajnoj, tamen, oni akiris nur kelkajn dekojn da subskriboj en granda urbo. Kion konkludi? Ĉu la viroj de tiu urbo estas tiom seksismaj aŭ perfortemaj? Kiel iu rimarkis en la artikolo, la problemo estis ke al viroj iom malplaĉis ke oni supozis ke ili devu subskribi ion tian, kvazaŭ ili ĉiuj estas ja tiom

perfortemaj. Kaj tial malmultaj subskribis. Oni ne rajtas konkludi tamen ke preskaŭ ĉiuj viroj en tiu urbo favoras perfortan traktadon de virinoj pro ilia nesubskribo.

Ni revenu al Manifeston 2000. Mi proponas ke neniu deca homo kontraŭus ĝiajn postulojn. Ili estas laŭdindaj celoj. Tial, kion montros amasa subskribo? Estas iom kvazaŭ oni demandus, 'Kiu deziras justecon, pacon ktp.?' Plue, eĉ se oni ne vere intencas plenumi la postulojn de la Manifesto 2000, oni kompreneble facile povas ĝin subskribi - tia estas petskribo. Neniu poste riproĉos lin/ŝin pro agoj kontraŭ la postuloj de la manifesto. Konklude, manifesto nepre ne estas efika maniero ŝanĝi la agadmanieron de homoj. Oni ja kuraĝigu al homoj sekvi la principojn skizitajn en Manifesto 2000; sed oni ne malŝparu la tempon de movadanoj kaj aliaj per kolekto de subskriboj. La praga manifesto, mi substreku, havas utilan rolon, atentigante eksterulojn pri Esperanto kaj per demandoj al ili subskribi kaj per (ni esperu) fina impona sumo da kolektitaj subskriboj por prezento al la monda publiko. La fina listo de subskribantoj de Manifesto 2000 signifos nenion: ĝi estos nur listo de bonvolemluloj kaj hipokritoj. Nur la agoj de homoj plenumos la celojn de UN kaj UNESKO.

Geoffrey Greatrex

(La artikolo unue aperis en *Inter Ni*, junio 2000)

LUNDO, MARDO... TROVI LA TAGON

Ĉu vi scias, en kiu tago de la semajno vi naskiĝis? Se ne, apenaŭ gravas! Tamen, mi konas facilan metodon por rapide kalkuli la semajntagon de iu ajn dato, kaj mi pretas malkaŝi al vi la sekreton. Per ĝi vi povos imponi al viaj amikoj... se ili nur ne legis tiun ĉi revuon.

La metodo funkcias por iu ajn dato inter 1900 kaj 2099. Klariginte ĝin, mi klarigos ankaŭ kiel ĝin etendi por aliaj jarcentoj de la gregoria kalendaro.

Mi donos kiel ekzemplon la propran naskiĝtagon, 9 oktobro 1971.

Unue, prenu la du lastajn ciferojn el la jarnumero: 71.

Due, dividu per 4 kaj ignoru la reston: $71/4 = 17$ (restas 3, sed ni ignoru ĝin).

Sumigu la du ĝisnunajn nombrojn: $71 + 17 = 88$.

Nun aldonu la numeron de la tago en ĝia monato: $88 + 9 = 97$.

Se temas pri dato en januaro aŭ februaro de superjaro, subtrahu 1. Tio kompensas la ekziston de la dudek-naŭa de februaro en tia jaro. 1971 ne estis superjaro, do ĉi-ekzemple ni faru nenion.

(Superjaroj estas baze tiuj kun kvarobla numero (2004, 2008, ktp); sed inter la centoblaj jaroj (1900, 2000, ktp) superjaroj estas nur tiuj kun kvarcentobla numero. Do 1900 ne

estis superjaro, sed 2000 jes estis. Ne konfuziĝu!)

Fine, necesas aldoni numeron el tabelo, kiu varias laŭ la jarcento. Por la centoj 1900-1999 kaj 2000-2099 la tabeloj estas:

jan feb mar	1 4 4	0 3 3
apr maj jun	0 2 5	6 1 4
jul aŭg sep	0 3 6	6 2 5
okt nov dec	1 4 6	0 3 5
	(1900-1999)	(2000-2099)

Do por mia naskiĝdato en iu oktobro inter 1900 kaj 1999, ni aldonu la oktobran numeron el la maldekstra tabelo: $97 + 1 = 98$.

Fine, dividu per 7. La resto indikas, pri kiu tago de la semajno temas:

resto tago:		
0 sabato	4	merkredo
1 dimanĉo	5	ĵaŭdo
2 lundo	6	vendredo
3 mardo		

Divido de 98 per 7 faras 14 sen resto, do mi naskiĝis en sabato. Mi devas konfesi, ke mi persone ne memoras la eventon, sed rigardo al malnova kalendaro konfirmas la konkludon!

La sistemo povas aspekti komplike, sed fakte ĝi estas tre simpla, kaj post iom da ekzercado oni povas lerni apliki ĝin ene de unu-du sekundoj.

La plej komplika parto de la aranĝo estas evidente la tabeloj, sed rerigardu ilin. La tabelo 1900-1999 estas facile memorebla:

$$1\ 4\ 4 = 144, \text{ kvadrato de } 12$$

$$0\ 2\ 5 = 25, \text{ kvadrato de } 5$$

$$0\ 3\ 6 = 36, \text{ kvadrato de } 6$$

$$1\ 4\ 6 = 146, \text{ kvadrato de } 12... \text{ plus } 2$$

La tabelo 2000-2099 estas ja malpli eleganta, sed ĝi sekvas la modelon de la alia: la nombro en la lasta horizontalo egalas tiun en la unua... plus 2; kaj la nombroj en la dua kaj tria horizontaloj simile diferencas per 11.

Se vi volas krei tabelojn por aliaj jarcentoj, vi devos unue scii, en kiu tago de la semajno okazis la unua de januaro de la komenca centobla jaro (ekzemple de la jaroj 1800 aŭ 2100). (Kelkaj protestos, ke jarcento komenciĝas ne en jaro "cent" sed en jaro "cent unu", kaj ili tute pravas. Sed tiu fakto ne helpas ĉi tie.)

Ni kreu tabelon por la jarcento 2100-2199. La ĉi-supraj tabeloj montras, ke la unua de januaro 2000 estis sabato. Eble vi memoras ĝin -- aŭ preferas ne!

La nuna jarcento (2000-2099) enhavos 25 superjarojn kaj 75 ordinarajn jarojn; do la unua de januaro 2100 okazos $(25 \times 366) + (75 \times 365) = 36525$ tagojn poste. Aldonu tiun grandan nombron al la nulo, kiu reprezentas la komencan sabaton (1 januaro 2000), kaj redividu per 7. La resto estas 6, do la unua de januaro 2100 estos vendredo.

De tiu vendreda 6 subtrahu 1, kaj enskribu la rezultan 5 en la januaran ĉelon de la konstruata tabelo. Januaro enhavas 31 tagojn, do en la februara ĉelo staru la resto post seponigo de $(5 + 31)$, kio estas 1. Februaro ŝajnigas ĉiam havi 28 tagojn (ĉar superjaroj kompensiĝas aliloke), do en la martan ĉelon iras la resto post seponigo de $(1 + 28)$, kio ankaŭ estas 1. Vi ĉiam trovos, ke la numeroj en la februara kaj marta ĉeloj estas samaj (kaj ke simile pariĝas aprilo kaj julio, kaj ankaŭ septembro kaj decembro).


Se vi daŭrigos ĝis decembro, vi fine havos jenan tabelon:

jan feb mar	5 1 1
apr maj jun	4 6 2
jul aŭg sep	4 0 3
okt nov dec	5 1 3
	(2100-2199)

Kiel ekzercon mi lasas al vi krei la tabelon 1800-1899. Atentu, ke la jarcento 1900-1999 enhavas nur 36524 tagojn (ĉar 1900 ne estis superjaro)! Kiam vi subtrahas tion de 2 vi ricevos minusan nombron; antaŭ ol vi dividus per 7, vi devos aldoni 36526 (sepoblon sufiĉe grandan por repozitivigi la nombron).

Agrablan ĝisdatigon!

Simon Davies (Wellington, Britio)



KANADO ESTAS MODELO POR LA OLIMPIKAJ LUDOJ DE LA JARO 2000

Aŭstralia Diplomato Laŭdas Uzadon de Esperanto en Montrealo

D-ro Ralph Harry, AC, CBE, eksa ambasadoro aŭstralia al la Unuiĝintaj Nacioj, parolante al la Halifaksa Esperanto Grupo la 14-an de aŭgusto 1999, diris ke aŭstraliaj organizantoj de la Ludoj en 2000 serĉis metodojn por emfazi la olimpikajn idealojn de paco kaj amikeco.

Li rememoris ke li laboris kun la Esperanta Asocio de Montrealo je 1976 por faciligi komunikadon inter atletoj kaj vizitantoj per frazlibreto kiu utiligis Esperanton kiel ponto al kelkaj aliaj lingvoj. Tiu laboro sekvis lian agadon en 1971-1972 en Germanio kie, kiel aŭstralia ambasadoro en Bonno, li sugestis kaj verkis frazlibreton por la organizantoj de la Munkenaj Ludoj. En Kalgario oni eldonis similan frazlibreton por la Vintraj Ludoj. La organiza komitato laŭdis la kontribuon de Esperanto.

D-ro Harry diris ke la Aŭstralia Esperanto-Asocio jam kunlaboras kun la Sidneja organizanta komitato, kiu deziras aldoni al la reputacio kiun gajnis Aŭstralio pro la organizado de la "Amikaj Ludoj" de 1956. Frazlibreton oni jam prov-verkis, kaj oni ankaŭ esploras aliajn eblecojn por uzi la internacian lingvon ĉe la Olimpika Vilaĝo kaj la diversaj lokoj.

D-ro Harry substrekis ke ĉiuj esperantistoj kiuj venos al Sidnejo kompreneble tutkore bonvenigos kaj helpos la aŭstralia komunumo de esperantistoj.

D-ro Harry diris ke estis utilaj kanadaj kontribuaĵoj ĉe la Universala Kongreso en Berlino de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto. Li laŭdis la precizan analizon de la kongresa temo "Tutmondiĝo — ŝancoj por paco?" Simpozio, kiu inkluzivis ne-esperantistajn lingvajn ekspertojn, pridiskutis la efikon de tutmondiĝo sur etnaj lingvoj. La Kongreso akceptis rezolucion kiu substrekis la rolon de neŭtrala lingvo por faciligi komunikadon en tutmondiĝanta mondo sen lingva super-regado fare de iu ajn ŝtato aŭ korporacio. La rezolucio ankaŭ rememoris la helpon kiun provizis la Esperanto-movado por subteni ekologian sekurecon kaj daŭrigantan disvolviĝon.

Dum la vizito, D-ro Harry kaj sia kunvojaĝantino turistis en Grand Pré, Wolfville kaj Peggy's Cove krom en la urbocentro de Halifax. Post la vizito ili vojaĝis al Vankuvero, kie D-ro Harry ĉeestis la Universalan Kongreson de 1984, antaŭ sia reveno al Sidnejo, Aŭstralio.

— Ralph Harry plejparte verkis ĉi tiun artikolon por la loka anglalingva gazetararo, sed oni ne eldonis ĝin.

AKROSTIKO POEZIE PREZENTITA

Vertikale: La komencliteroj de naŭ vortoj:

Poeto, tradukisto, redaktoro,
En Nederlando estas li pastoro. [9 literoj]

Vertikale: La lastliteroj de naŭ vortoj:

Libro grandskala, kun enhav' varia —
Tiu, Latina, estas verko lia. [9 literoj]

Horizontale (la naŭ vortoj):

R = radiko.

1. More, kulture, ne tre altnivela,
Ofte sovaĝa, kruda kaj kruela. [7 literoj]
2. Malgranda best' kampara, karnovora;
La vintra pelto estas tre valora. (R) [5 literoj]
3. Sekvo de ies ago aŭ kalkulo.
Post ekzameno, eble jen — gratulo. (R) [6 literoj]
4. Eble ŝi dolĉe kisas vian vangon —
Sed — zorgu! — poste suĉos vian sangon!
[7 literoj]
5. Jen eta fiŝo, kies ĉefa rolo
Estas kun salo kaj en ladskatolo. (R) [7 literoj]
6. Belega makulita kat' majestas —
Sed taŭga por la hejmo ĝi ja ne estas. [8 literoj]
7. Bildigi al ni ion en la menso,
Kaj, iasence, krei nur per penso. (R) [4 literoj]
8. Montri senzorgon kvazaŭ tre blindan,
Malatentadi ion atentindan. [8 literoj]
9. Abundaj vortoj sed mallerta uzo;
senco, fraz-nebulo kaj konfuzo! [9 literoj]

(Ekzemple:
ne »pomo«,
sed »pom'«.)

ŜABLONO:

1. X X X X X X X
2. X X X X X
3. X X X X X X
4. X X X X X X X
5. X X X X X X X
6. X X X X X X X
7. X X X X
8. X X X X X X X
9. X X X X X X X X X

Anstataŭ ĉiun
ikson per la
ĝusta litero laŭ
la donita in-
formo

— kontribuis Marjorie Boulton

La solvon oni trovos en la venonta numero. Feliĉan cerbumadon!

Rubriko de ŝercoj:

Nuntempe Kon Fu Zita tre fieras pri sia frato. Dum multaj jaroj la faroj de Aku estis familia sekreto. Tamen, nun frato Aku estas verkisto kaj oni eldonis lian libron, *Kiel Fariĝi Sukcesoplena Krimulo*. La libro estas ne nur teoria afero, ĉar ĝi staras sur realismo kaj veraj spertoj. Jen la paĝo por montri la enhavon:

KIEL FARIĜI SUKCESOPLENA KRIMULO

fare de Aku Zita

Spertulo Utiligas La Proprajn Spertojn Por Elmontri La Vojon

TABELO PRI ENHAVO

<u>Ĉapitro</u>	<u>Paĝo</u>
Kiel presi sendifektan falsan monon	3
Kiel elspezi falsan monon sen eltrovo	12
Kiel reagi al policano kiam vi estas arestita	29
Kiel trovi lertan defendo-advokaton	41
Metodoj por manipuli la justic-sistemon	58
Kiel korupti persekutiston kaj ĵurion	72
Restu aplomba malgraŭ malfavora verdikto	87
Kiel influi juĝiston kaj gajni mallongan puntempon	99
Kiel plani 25 jarojn en malliberejo	111
Aranĝu vian prizon-vivadon kiom eble plej bona	125
Travivu malgraŭ sola loĝado en punĉelo	136
Kiel trompi la "komisionon por frua honorliberigo"	144
Lernu ridi kune kun via komisiono	157
Kiel ĝui longdaŭran enkarceran vivon	167

Steĉjo Norvell (el *Inter Ni*, junio 1998)

